# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ

http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k67.htm





**Nro 67a** **Julio/septembro 2005**

# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

*Prezidanto:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*c/ Jabonerías, 6-3ºD,*
*ES30 001 Murcia (Hispanio)*
*Vicprezidanto:* **Pedro Ruiz García,**
*c/ Almenara, 17-2º B,*
*ES30 004 Murcia (Hispanio)*
*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*Av. Murcia, 7-3º A*
*30110 Cabezo de Torres (Murcia)*
*Kasisto :* ***Carmen Hernández Valdés,***
*Avdª Marina Española, 15-3ºA*
*30008 Murcia.*
*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA*
**ISSN 1697-6460**

*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras**

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al* ***nova konto nº 2043-0138-14-090002040-3*** *Sen aldona kosto.* La abono kostas 5 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.

**Kovrilo**: Mala Zimetbaum, unu el la kompatindaj viktimoj de arbitracio kaj maljusteco en Oswicem, alidirite Auschwitz.

***Kajeroj el la Sudo*** regule interŝanĝas kun:

1 ***Esperanto***, redaktata de Stano Marĉek,
2 ***Boletín***, de Miguel Gutiérrez Adúriz,
3 ***Monato***, de Stefan Maul,
4 ***Juna Amiko***, de Geza Kuruez,
5 ***SAT-Amikaro***, de Jean Selle,
6 ***Internaciisto***, de Luis Serrano.
7 ***La Kancerkliniko***, de Ĵak le Puil,
8 ***Litova Stelo***, de Petras Ĉielauskas,
9 ***La Migranto***, de Antje Noordewier,
10 ***SLEA-Informilo***, de P. Persson,
11 ***Naturista vivo***, de Ervin Fenyvesi, kaj
12 ***La verda proleto***, de komitato.

Al ĉiuj, dankon pro via subteno kaj lernigo.



Ne subskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

## Enhavo

Redaktore .......... 3
Informoj de la prezidanto: Pri HALE kaj SATeH 4
Mortis Fernando .......... 6
Demokratio .......... 8
Pri *fremda* kaj *denaska* .......... 9
Oswicem .......... 18
Komenski .......... 15
La Faraono, ĉapitro 14-a .......... 17

# Redaktore

## Milito al milito

Ŝajnas, ke en la homa historio konflikto venas kaj revenas, kaj se oni ne bone traktas ĝin, konflikto iĝas pli granda. Tio okazis, ekzemple, pri la Unua Mondmilito: pro ĝia malbona solvo, venis la Dua, multe pli danĝera kaj grava.

Inter esperantistoj aperas konfliktoj, konfliktetoj kaj stultaĵoj. Gravaj sekvoj povas veni el tio, ke oni misprenu la lastan kiel unu el la aliaj du. Konfliktioj inter esperantistoj ŝajnas ne manki, kaj tio elprenas rimedojn kaj fortojn, kiujn oni bezonas por solvi la verajn konfliktojn de Esperanto. Se oni ne akceptas nian solvon kiel pontolingvon, ĉio, kion ni diras kaj faras, utilas al neniu, kaj ni kondutas kvazaŭ beboj, kiuj opinias, ke nia umbiliko estas la plej grava loko de la universo.

De kiam Jakvo Schram iĝis la Prezidanto de SAT, ĝi infektiĝis per mortiga malsano, kiu detruos ĝin finfine, ĉar ĝi politikigis la asocion, kaj ĝi prenis politikajn decidojn, kiujn la asocion akceptis, eĉ se ili perfortas la propran Statuton de SAT. Ŝajnas, ke Jakvo estas pli grava ol Statuto: kiam oni elektis min ano de la Ĝenerala Konsilantaro de SAT por HALE, Jakvo ekskludis min el tiu organo, perfortante la Statuton, pro tio, ke **li** opiniis, ke por esti en tiu organo oni ankaŭ devas esti ano de SAT. Neniu kontraŭis tion. Poste, oni organizis referendumon por ŝanĝi la Statuton, tiel, ke por esti reprezentanto de LEA en la Ĝenerala Konsilantaro de SAT, oni devas esti ano de tiu asocio. Sed mi reaniĝis al SAT, kaj mi petis, ke oni honoru la elekton de mia LEAo. Tamen, oni organizis enketon inter la ceteraj LEAoj, kaj oni decidis, ke oni *preferas*, ke HALE ne plu estu LEAo. La Statuto de SAT diras nenion pri *eksigon* de LEAo. Sed ne gravas. La malamo de tiu homo ne konas limon, kaj la akceptemo de la ceteraj anoj de SAT ankaŭ konas neniun limon, se temas pri la volo de tiu *neanstataŭebla* kamarado, Jakvo Schram.

Iam estis germano, kiu falsajn akuzojn asertis laŭte kontraŭ judoj, kaj ankaŭ oni ne kritikis liajn diraĵojn. Rezulto de tio estis, ke milionoj da homoj mortis en ekstermejoj en Pollando, jam konkerita de nazia Germanio. Mi ĵus finas partopreni internacian lernejan projekton, pri kiuj mi parolas en artikoloj je paĝoj 10-a kaj 15-a, kaj en la fina prezento de tiu projekto ni montras kelkajn bildojn pri la Ekstermejo Oswicem, en Pollando, kiun ni devis viziti dum la daŭro de tiu projekto. Tiu estas terura vizito, kaj mi memoras, ke niaj polaj kunprojektanoj rifuzis eniri la ejon kun ni, escepte de unu viro, kiu fakte ne povis ne plori, kiam li vidis tion. Ni vidis torturilojn, vestaĵojn faritajn kun hararo homa, saponon kun homa graso..., kaj aliaj teruraĵojn. Kaj, plej kortuŝe aparte por mi estis vidi la kolekton de valizoj de tiuj homoj, kiuj kredis, ke ili iam eliros de tiu kampo. La 6-an de majo estis la 60-a datreveno de la liberigo —ni diru fermo!— de tiu kampo fare de la soldatoj usonaj. Ni pensu, antaŭ perforte kaj senracie krii *Ne al milito!*, ke necesis tutan militon fermi tiun kampon de honto por homaro. Pacistoj, fakte, ne fermis ĝin. Ĉu Oswicem minacis la vivmanieron usonan tiutempan? Ĝi fakte minacis nin ĉiujn. Ni malebligu, ke iam ajn alia Oswicem aperu.

Sub la teksto oni vidas la ombron de Edvardo Galinski, kiun la germanoj murdis en Oswicem kiam li estis 17jaraĝa. Fi al tiuj, kiuj subpremas liberecon!

# Informoj de la prezidanto

## Pri HALE kaj SATeH[1]



En la n-ro 4-a de ***Sennaciulo*** aperis la artikolo nomita *Kio pri SAT en Hispanio*?, kiu parolas pri SAT kaj HALE. En tiu artikolo aperis eraroj, kaj mi, kiel Prezidanto de HALE, devas respondi ilin:

__1e__ *Grava turnopunkto tamen estis la ŝanĝo en la redaktoreco de la bulteno... Pli grave estas, ke la revuo fariĝis la ilo per kiu la redaktoro gvidis siajn personajn batalojn. Jen kontraŭ la gvidorganoj de la asocio mem, ekzemple per kritikoj kontraŭ la prezidanto de la asocio aŭ aliaj kamaradoj, jen rekte kontraŭ SAT...*

**__1a respondo__**: Ĉiu redaktoro donas sian propran stampon al la revuo. Tiel, kiam li estis Marco Botella, la revuo enhavis sufiĉajn artikolojn pri literaturo kaj porezio, sed Jesuo estas malferminta la revuon al la temoj socialaj kaj politikaj kaj krome implikiĝis por defendi la ideojn kunhavitaj de ni ĉiuj, kiel la esprimliberon. Do, ne estas kritikinde, ke la redaktoro kritikas la prezidanton, ĉu tiun de HALE, ĉu tiun de SAT. Tio ĉi estas sana demokratie. Tial oni povas kritiki ankaŭ al SAT kiel reciproke SAT povas kritiki al ni. Mi ne komprenas, kiel oni povas timi la kritikojn. Alia tre malsama afero estas la kritiko sen argumentaro. Mikredas, ke ekde HALE kaj per la ***Kajeroj el la Sudo*** oni estas farinta kritkojn argumentitajn, sed la aliajn mi ne komprenas.

__2e__ *Tion akompanis la videbla ŝanĝo de la ideologia karaktero de la artikoloj. Eble por nehispanoj multaj nuancoj estas malfacile percepteblaj, sed kiam la recenzataj libroj estas tiuj de Federico Jiménez Losantos (ĵurnalisto kiu nun fariĝis la ĉefa intelekta referenco de la plej radikala dekstro en Hispanio, kondukanto de la matena novaĵprogramo de la radiosatacio de la hispana episkoparo)..., aŭ Pío Moa (eksmaŭisto, nun reviziista historiisto de la ekstrema dekstro, kiu famiĝis pro sia akuzo al la respublikanaj gvidantoj pri la komenco de la hispana civila milito), kaj kial la recenzoj estas klare pozitivaj, oni povas imagi, ke io ne iras glate en progresema asocio...*

**__2a respondo__**: ***Kajeroj el la Sudo*** estas malfermita al la malsamaj vidpunktoj pri la problemoj sociaj kaj politikaj. Ĉiu artikolo estas argumentita objektive; ne surbaze de kredoj; kaj ĉiu ajn aritkolo povas esti kontraŭargumentata sen baroj.

La kunlaboraĵon de Isabel Acevedo pri la mortintoj dum la civila hispana milito mi mem respondis pruvante siajn erarojn. Mi bedaŭras, ke vi konfuzas la publikigon de serion de artikoloj kun ŝanĝo al ideologio reakcia. Tio estas eraro, ĉar ***Kajeroj el la Sudo*** estus reakcia se ĝi evitus la publikigon de la respondaj artikoloj. Se la kunlaborintino Isabel Acevedo rajtas publiki siajn artikolojn, ankaŭ personoj de kontraŭaj ideoj rajtas, kaj se tio ĉi estus

[1] Letero sendita al Estimataj Prezidanto de SAT kaj Redaktoro de ***Sennaciulo*** por publikigo en tiu magazino.

malhelpata, la revuo estus reakcia, kia ĝi ne estas, ĉar tio ne okazas.

**3e** *La guto, kiu plenigis la glason estis la artikolo de falangisto..., aperinta en la numero 46ᵃ de* ***Kajeroj el la Sudo*** *(julio 2000)...*

**3ª respondo**: La kritikoj ricevintaj pro tiu artikolo celis la personon mem, kiu ĝin verkis, ne la enhavon de ĝi; kiun mi mem defendas. Do, estas same kiel en la ĉina imperio, kie oni ordonis mortigi la mesaĝiston portantan malbonajn novaĵojn anstataŭ elradikigi la problemon.

La kapitalismo ne estas solvinta la problemon de la malriĉeco, kaj eĉ en la landoj de pli evoluinta kapitalismo, la laborkondiĉoj, la kondiĉoj de la ĉiutaga ekzistado estas malfacilaj. Ĉu povas ***Kajeroj el la Sudo*** rifuzi la publikigon de artikolo, kiu atakas tiujn kondiĉojn estigitaj de la kapitalismo ĉar ĝi estas rubrikita de falangisto? Se jes, tiam ni ankaŭ devus rifuzi la nunajn avantaĝojn donitaj de la faŝismo al la laboristoj, kiel ekzemple: la pagataj ferioj kaj la kolektivaj laborakordoj (avantaĝoj, kiujn la kapitalismo volas forigi) nur kaŭze de ties deveno (faŝismo).

Alia malsama afero estus se la artikolo laŭdus la faŝismon, tiam la artikolo ne lokhavus en tiu ĉi revuo, aŭ neprus la samtempa respondo kontraŭa. Estos nenia respondo de la hispana maldekstrularo de SAT atakante la enhavon de la artikolo de la falangisto, ili nur kritikis la artikolon kaŭze de ĝia verkinto. Mi faris kritikon pri la artikolo en la numero 48-a per la artikolo institucia *Informas la Prezidanto*.

Aldone, surprizas min, ke oni ne menciu la sintenon de ***Kajeroj el la Sudo*** pri la Milito de Jugoslavio, kiu estis oponanta, kaj ankaŭ lian sintenon kontraŭ la Milito de Irako. Kontrolu la artikolojn *Krio el Jugoslavio* (KelS n-ro 43-a, de julio de 1999, http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k43krio.htm, kie li donis liberan forumon al Zoran Ciric, esperantisto serba, kiu multe suferis tiun sensencan militon), kaj *Averto al Registaro* (KelS n-ro 58-a, de aprilo de 2003, http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k58kov.htm).

Se ni estas tiom fiaj, se ni donas voĉon al ekstremodekstro, se ***Kajeroj el la Sudo*** iĝis, laŭ tiu artikolo, la voĉon de la dekstro, kiel eblas, ke nia sinteno estu tiom ekzakta kontraŭ milito? Ni devas memorigi, ke la pozicio de ***Kajeroj el la Sudo*** kaj de HALE antaŭ la milito estis publike gratulata de kelkaj anoj de SATeH (*mi ankaŭ subskribas tiun averton*, diris Antonio del Barrio). Tion oni ne mencias en la artikolo de niaj kamaradoj. Sed mi ne miras pri tio.

**4e** *La nuleco de HALE videbla montriĝis konekse al la organizado de la kongreso de SAT en Alikanto en 200ᵃ, kie HALE havis tute neniun rolon. La redaktoro eĉ ne partoprenis la kongreson, kvankam li ja aperis en la kongresejo, ŝajne simple por fari raporton pri sia bulteno.*

**4ª respondo**: Okaze de la kongreso de SAT en Karlovy Vary, mi parolis kun Jesuo (laŭ vi, via malamiko) por aranĝi la kongreson de SAT en Murcia. Paralele Marteno Bustino volis aranĝi ĝin en Alikanto. Mi rezignis aranĝi ĝin en Murcia pro la morala aŭtoritato de Marteno Bustin kaj mi proponis al li, ke la organizaj aspektoj estu por Jesuo kaj mi dum li respondecu pri la kontaktoj kun aŭtoritatuloj kaj la

financado, ĉar alimaniere ni estus devigitaj ofte delokiĝi 70 kilometrojn (de Murcia al Alikanto, kaj reen).

Proksimume en januaro ni kunvenis en la stacidomo de Alikanto kaj ĉeestis Marteno, sia kara edzino, Jesuo kaj mi. Marteno ne diris, ke li ne volas la partoprenon de HALE pri la organizado de la kongreso menciita, sed argumentis, ke tio estas afero de la SATanoj (kvazaŭ la HALEanoj estus anoj de la Fonduso Valuta Internacia…), tio estas, li rifuzis la helpon de HALE. Ĵus entrajninte Jesuo volis publikigi ĝin en ***Kajeroj el la Sudo*** KAJ MI MALKONSentis ĉar tio povus krei malbonan etoson antaŭkongresan, kaj mi konsciis pri la neceso de sukceso de la kongreso –nun mi pentoĉagrenas, ke ***Kajeroj el la Sudo*** ne publikigis ian ajn mencion de tiu kunveno—. Bone, ni ĉiuj devas lerni kaj nature, post la pluvo kaj repluvo mi ne silentos.

Konklude, la nuleco de HALE devenis de la rifuzo de la organiza komitato akcepti la kunlaboron de HALE, ne pro fieco aŭ fuŝeco atribuebla al nia asocio.

Nun oni kritikas nin pro ne helpo al Kongreso de SAT en Alikanto, sed Jesuo de las Heras proponis prelegon pri ***Kanto Flamenka*** kaj ĝi estis malpermesita; kaj mi mem proponis prelegon pri ***La Markizo de Sade***, kiun ankaŭ la kongresa komitato rifuzis.

Kiu ne volis kunlabori? Kiu rifuzis nian kunlaboradon? Kaj nun ni devas legi, ke HALE ne kunlaboris je la Kongreso . Veras, ke oni ne permesis, ke ni kunlaboru. Se nun estus la sekvanta tago al tiu rifuzo, ĝi estus en ĉiu esperantista organo la reakcia sinteno de la organizantoj de la kongreso.

**<u>5e</u>** *La sinsekvo de la okazaĵoj portis nin al la kreado de tute aparta asocio. Tio ĉi estas eble la agado malplej komprenita de multaj kamaradoj… Ni preferis la agadon por Esperanto kaj por SAT, kaj tio tute ne eblis sen la uzo de la nomo HALE…*

**<u>5ª respondo</u>**: Kiam mi ricevis la primiademisian petaron, mi publikigis ĝin sur la 1-a paĝo de la revuo: jen io, kion vi estas kaŝinta, ĉar ni estas la nura societo de Esperanto, kiu agis tiel kaj pere de elektronika poŝto mi proponis transdoni la asocion al la demisipetintoj. Ĉar ili ne estis HALEanoj, mi nur petis ilin ties aniĝon, kaj post unu jaro mi farigos balotaron kaj mi mem promesis peti la elekton de tiuj, kiuj petis mian demision, kiel estraranojn. Tamen, la komitato de SATeH rifuzis la proponon. Tial vi (SATeH) respondecas esti dividintaj la progreseman esperantistaron de Hispanio, krom esti faciligintaj la kondiĉojn por la milito inter SAT kaj HALE.

En la kazo, ke estu akceptita mia propono, kiu kalkulis kun la apogo de la estraro de HALE, nur ekzistus sola asocio kaj vi estus evitintaj la hontindan spektaklon de la forpelo kontraŭprocedura de HALE kiel LEAo de SAT, krom aliajn fiaferojn pri kiuj mi ne raportu ĉiokaze.

**<u>6e</u>** *En la lastaj monatoj, oni permesis, ke Jesuo de las Heras triafoje realiĝu al SAT, sen antaŭe averti la hispanan peranton, kaj, kompreneble, li tuj komencis brui pri sia propra stiuacio en la asocio…*

**<u>6ª respondo</u>**:Antaŭ longe la problemo estis, ke Jesuo ne estas SATano: oni rifuzis kontakton kaj kunlaboron ian ajn al Jesuo ĉar li ne estas SATano, tiagrade, ke eĉ oni ŝanĝis la Statuton de SAT por eviti la partoprenon de li, kaj kiam Jesuo decidis remembriĝi al SAT, la problemo estis, ke SAT ne volas Jesuon ene de si (granda eraro) kaj malebligas lin plu esti membro. Ne estas logike.

Se Jesuo iam foriris de kongreso oni analizu la kialon, sed mi ne pritraktos ĝin ĉar mi ne estis tie kaj nur konas la version de Jesuo, sed mi ankaŭ bezonus la alian, tial mi ne prijuĝos ĝin. Tamen, mi ja prijuĝos, ke HALE proponis al Jesuo kiel membron de la komitato de SAT, sed ili rifuzis la proponon ĉar li ne estas membro de SAT. Mankas seriozeco. Se HALE disponus de komitato kiel tiu de SAT –kaj estis granda decido krei ĝin—mi tre ŝatus, ke ĝin konsistigus; parte, sed ne entute; personoj, kiuj ne estas de HALE, ĝuste ĉar la celo de la komitato estas konsili, ne decidi.

Ĉio jam dirita faras min konjekti, ke ekzistas vera paniko en SAT kaj for de SAT. Se ***Kajeroj el la Sudo*** estas, laŭ vi, ***Kajeroj de Jesuo***, mi pensas, ke Jesuo estas *la Detruisto*.

Mi ne komprenas tiun sintenon de SAT, ĉar ĝi estas organizo, kie kunvivas diversajn tendencojn kaj ideojn, tiel ke anarĥiisto ne rilatas al komunisto, kaj tamen ili kunvivas en SAT.


La sinteno de gvidantoj de SAT estas simple persona al –aŭ kontraŭ—Jesuo de las Heras, kaj sekve, anstataŭ inkluzivi lin en la projektoj de SAT kaj aldoni energion, ili ekskludas lin post kiam Jesuo plenumis la postulojn de SAT, ekzemple reveni en la asocion.

Ĉu la afero estas, ke la gvidantoj de SAT ne havas projekton, kaj pro tio oni ne inkluzivas Jesuon?

En HALE ni faris proponon, per kiu ni inkluzivis tiujn, kiuj petis nian demision; kaj ili rifuzis ĝin. Jesuon oni postulis, ke li estu SATano, sed oni ne akceptis lin. Kien nin irigos tiu sinteno?

*Juan Antonio*

# Fernando mortis.




Kiam la ***Kajeroj*** jam finpretiĝas, venas la malgaja novaĵo, ke Fernando de Diego, la homo, kiu esperantistigis ***Don Kiĥoto***-n kaj kiu surprizis kaj regalis nin per la ***Granda Vortaro Hispana-Esperanto***, ĵus mortis la 1-an de julio. Estas bedaŭrinde, ke li ne estos persone inter ni, kiam oni omaĝos lin dum la tuj komencanta kongreso de la Hispana Esperanto Federacio.

Dum ni legos liajn tradukojn kaj originalajn librojn, li daŭre estos inter ni. Ni relegu ***Cent jaroj de Soleco***, aŭ alian el liaj interesaj tradukoj aŭ originaloj en Esperanto. Kaj oni ne forgesu lian ***Nuevo Método de Esperanto***, ilon por iĝi tre kompetenta esperantisto.

# Demokratio

Ŝajnas, ke oni devas elekti inter libereco kaj paco ĉiun tagon kaj ĉiuetose. En Hispanio ni vidas nun, ke kaj la registaro —kiun civitanaro neniam elektas— kaj la juĝistaro —kiun civitanaro neniam elektas— kaj la leĝofarantoj —kiujn civitanaro duonelektas ĉiujn kvar jaroj— favoras teroristojn, kiuj rekte vundas la interesojn kaj la vivojn de la civitanaro.

Oni povas skandaliĝi, kiam oni legas tiun aserton mian, ke en Hispanio demokratio tute ne ekzistas. Tamen, se oni analizas la trajtaron pri Demokratio moderna, kiun Montesquieu difinis en sia verko ***La spirito de leĝoj***, laŭ kiu en vera demokratio ekzistas tri povoj, la ekzekutiva, la juĝa kaj la leĝofaranta, kiuj estas tute sendependaj inter si, kaj kiuj observas kaj kontrolas unu la aliajn du, oni ne povas ne pensi pri la tristiga situacio en Hispanio: la civitanoj elektas ĉiujn kvar jarojn, sed ne tiujn, kiujn ili deziras, ke regu ilin, sed tiujn listojn, kiuj la politikaj partioj prezentas al ili: se mi deziras, ke konkreta homo estu la Prezidanto de Hispanio, mi tute ne povas elekti lin aŭ ŝin: li aŭ ŝi devas aparteni al politika partio, kaj en tiu politika partio nur partianoj —ĉu almenaŭ ĉiuj el ili?— rajtas voĉdoni kaj decidi ĉu Jozefo, Alfredo, aŭ Edvardo aŭ Marjano estas en la listo. Eĉ pli, en kiu loko ili estas en la listo, tiel, ke se mi elektas, ekzemple la liston prezentitan de la Socialisma Partio, por ke la homo, kiun mi deziras, ke reprezentu min, estu en la Hispana Parlamento, ĉiuj tiuj, kiujn la Socialisma Partio metis en la listo antaŭ li aŭ ŝi, ankaŭ devas esti en la Parlamento. Kiam tiu ĉi malfermas, ili deputitaro —ne ni la civitanaro— elektas tiun, kiu prezidos la registaron. Kaj li aŭ —ĉu iam?— ŝi tute libere elektos la ceterajn ministrojn. Ni vidas, ke kaj la registaro kaj la Prezidanto de la Registaro vere ŝuldas fidelecon ne al civitanaro, sed al la partio politika, kiu estas tiu, kiu vere elektis ilin. Kaj se vere la Prezidanto de la Registaro estas ankaŭ la plej grava ano en sia partio —ni diru, ĝia *gvidanto*— tio eĉ endanĝerigas la fakton, ĉar lasas en la manoj de nur unu homo la tutan povon. Kaj tio estas, esence, la difino de diktatoreco kaj gvidas nur al korupteco.



Vere la juĝistoj povus kontroli la registaron kaj la parlamenton per siaj sentencoj... Sed de 1985 oni interkonsentis, ke la Superan Konsilon de la Povo Juĝa elektas la parlamento laŭ la partopreno de la diversaj politikaj partioj. Se ekzistintus tiam partio, kiu vere reprezentas la interesojn de la popolo, ĝi denoncus tion tiam. Sed ili ĉiuj volis parton de la kuko. Kaj la kuko de justico malaperis el la menuo de simpla civitano: la juĝistoj ne plu protektas nin kontraŭ arbitracio fare de la parlamento —Leĝo de la nekreskulo, nerespondeca supercivitano— aŭ la Registaro —iro al kaj foriro el Irako, Afganio, LOGSE—.

Sed ne gravas, ke estas defakta diktatoreco —kvarjarvivebla, vere—, sed tio, kio vere zorgigu nin estas, ke en Hispanio nuna tute ne ekzistas, esence, demokratio. Ni ne elektas aparte la Prezidanton, kiel en Francio aŭ Usono, kaj poste la parlamenton. La juĝistoj ne kontrolas sin interne, kaj la aliajn du povojn, kiel en tiuj landoj, aŭ en Britio, kie la decidoj de juĝistoj iĝas leĝoj, ĉar juro venas el popolo.

Do, se ni ne havas demokration, kaj korupteco —almenaŭ politika, ekonomia venos poste— regas la landon, kia sistemo ni havas en Hispanio nun? Ho, ni vidas, ke ni havas sistemon pri relativaj liberecoj..., nune. Kaj kun permeso de la registaro, evidente. Tio, baze, estas la ĉefa diverseco al la reĝimo de Francisko Franko. Mi ne povus kritiki la reĝimon antaŭ tridek jaroj per artikolo en magazino, eĉ esperanta. Sed libereco kaj demokratio estas du pilieroj de la sama konstruaĵo, kaj se unu el ili malaperas, la tuton falas pli frue aŭ malfrue.

Ŝajnas, ke niaj politikistoj ne reprezentas nin. Ŝajnas, ke ili reprezentas nur sin. Ni devas fari ion, se ni volas demokration en Hispanio.

Isidora HALE

# Pri "fremda" kaj "denaska"

Mi legis laste en artikolo pri Esperanto, ke ekzistas ĉirkaŭ 1000 *denaskaj* parolantoj, kaj ke Esperanto estas *fremdlingvo* por inter 100 000 kaj 3 000 000 homoj. Pri la kvanto de kalkulitaj esperantistoj mi ne komentos.

Tamen, mi ne konsentas, ke Esperanto estas *fremda* lingvo por esperantistoj. Fakte, mi dubas, ke estu homo, kiu sentas tiom da amo al sia denaska lingvo, kiom averaĝa esperantisto sentas al Esperanto. Oni ne forgesu, ke la denaska lingvo estas devigita sur homon, sed Esperanton oni ĉiam elektas lerni, oni adoptas Esperanton, dum la denaskan lingvon —eĉ se temas pri Esperanto, oni ne forgesu— estas laŭ la elekto de la gepatroj, ne de la homo mem. Oni kritikas —eĉ akre— kutime, ke oni baptas bebon en religion, elektitan de liaj aŭ ŝiaj gepatroj, sed tio signifas, en praktika realo, nur kapobaneton, kiam oni ne distingas ĉu oni estas ĉe publika preĝejo, ĉu ĉe homo sia. Sed *linvgobano* estas multe pli grava, ĉar ĝi daŭras —kutime— la tutan vivon, kaj se oni elektas poste iri en alian landon, kies parolata lingvo estas alia, la elekto estas grava kaj traŭma, kaj la elekto vere ne temas pri la lingvo, sed pri aliaj aferoj, kiel progreso en sia vivo, aŭ forfuĝo pro politikaj kialoj. Sekve, la lingvo, kiun oni devigas al bebo, havas dumvivan sekvojn, kaj eĉ se oni ornamas la aferon per konceptoj artefaritaj, kiel *heredaĵo de la prauloj* aŭ *riĉeco kultura*, kaj tiel plu, ĝi ne povas nei sian devigan trajton.



Esperanto, male, neniam estas devigata al iu ajn homo, se ni ne konsideras la —laŭ mi— kompatinda kazo de denaskaj esperantistoj. Tiuj ĉi ne havas la rajton diri ne al Esperanto, kaj tiu ebleco entenas —laŭ mi—la plej grava ero de Esperanto: <u>povante diri ne, oni akceptas Esperanton</u>! Denaskaj esperantistoj devas esti bravaj por *apostati* Esperanton, kaj tio povas —ja— signifi kverelon familian, same kiel religia apostato kverelas kun siaj gepatroj.

Sed nedenaskaj esperantistoj ja elektis Esperanton, ni ofte eĉ kverelis kun niaj familianoj, se ili primokis nin aŭ atakis la ideon de Esperanto. Sed tiuj kvereloj estas sufiĉe sengravaj, finfine, kaj ne reprezentas familian problemon. Esperanto estas lingvo elektita, defendita kaj eĉ amata de esperantisto,kaj sekve, mi trovas toigaĵon diri, ke ĝi povas esti *fremdlingvo* por esperantistoj. Tio estas erariga en paĝo, kiu informas pri Esperanto.

Mi, sekve, proponas, ke oni diru, ke Esperanto estas nia «Adoptolingvo», ĉar ĝi ne povas esti *fremda* al esperantisto, kaj ankaŭ proponas mi, ke ĝi *ne estu* <u>denaska</u>: niaj gefiloj ne estu malpli favorataj ol ni rilate al Esperanto: ili ankaŭ havu la eblecon elekti ĝin tiam, kiam ilia elekto havos sencon.

# Oswicem




Datreveno

Tio estas averto, kiun oni vidas en kampo pola Oswicem, germane dirite Auschwitz. Kadre de tiu interlerneja programo, Komenjuz, kiun mi referencis en la artikolo venonta (paĝo 15-a), mi vizitis tiun ĉi kampon antaŭ du jaroj, kaj nun, la jaron, kiam **datrevenas la sesdeka** jaro el tiu momento, kiam la usona armeo forpelis la germanojn de tie, kaj liberigis la restantajn maliberigitojn, mi deziras dediĉi kelkajn vortojn al tiuj homoj, kiuj estis amase buĉitaj tie pro naciismo kaj maltoleremo.

Nun oni emas pensi, ke naciistoj estas bonaj homoj, kiuj nur sopiras al liberigo de sia eta peco da tero. Tamen, oni memoru pri tiuj naciistoj-socialistoj, kiujn oni identigas kutime kun dekstro, sed kiuj volis ŝanĝi la mondon, kaj fondi novan globalan vilaĝon, kie nur *arioj* rajtos vivi.

La foto en paĝo 15-a estas en fornejo, kie oni forbrulis la kadavrojn de judaj homoj, kaj ne nur judaj, kiam ili ne plu povis labori. Apud tiu averto estis ankaŭ ĉambro, kie oni *duŝis* kompatindajn judojn per gazo, tiel mortigante ilin.

Oni diras, ke la historion verkas tiuj, kiuj venkis, kaj eble ne ĉio okazis tiel, kiel usonanoj diras nun[1]. Nu, mi ne povas kompreni, ke homa cerbo povas inventi malbonaĵon tiom senpian, kiel la fornejojn de Oswicem. La foto en la paĝo 13-a es-

[1]Tamen, oni kontrolu ***The Rise and Fall fo the 3rd Reich*** (La supreniro kaj subeniro de la 3.a Regno), de W. Shirer, London, Pan Books, 1960.



ne legis plu en tiu libro, kie li priskribas kial homoj diferenciĝas laŭ tri kategorioj: batalantoj, indiferentaj kaj perfiduloj. Ankaŭ en tiu libro li diras, ke oni elektu **naciismon** anstataŭ **patriotismo**.

Se oni legintus tiun libron tiutempe, aŭ almenaŭ gravaj politikistoj konus ĝin, eble ili farus la necesajn demarŝojn por ke la germana armeo ne invadu Ĉeĥion, kaj per simpla polica operacio, oni malebligus estontan militon, savante la mondon pri tia sensenca homamasbuĉado. Kaj tiu blua kandelo ne lumus en la triste fama forno de Oswicem hodiaŭ. Oni ne estis kuraĝa je 1938, kaj poste kuraĝo tute ne utilis je 1939. Ĝi utilis kelkajn jarojn poste nur kun la aldono de la grandega peza industrio de Usono, kiu devis ŝanĝi siajn celojn al produktado de militmaŝinoj pli rapide ol malamika Germanio kapablis fari. Oni kutime aŭdas homojn paroli kontraŭ militon, kaj kutime tio estas nobla kaj utila, sed en tiu tempo, kie la forprenado de

tas la loko, kie oni pafmurdis la homojn, kiuj ne plu povis labori laŭ subhomaj kondiĉoj. Ĝi estis en korto, kaj la fenestroj de la koncernaj konstruaĵoj havis lignajn kovertojn, por ke oni ne vidu tion, ke oni pafmortigas kunulojn. La procedmanieron oni vidas je la fino de ĉi tiu paĝo, laŭ bildigo de travivanto de tiu malfeliĉa mortejo.

Kaj oni ne povas ne pensi pri tio, kion oni devus fari, por ke tio ne okazis. Kaj oni sufiĉe facile trovas la *pacismon* de la koncernaj premieroj en Britio kaj Francio, Neville Chamberlain kaj Edvardo Daladjer', kiuj kredis, ke homo ne estas besto, ke Hitlero estis *bona naciisto*. Fakte, se oni legas la enkondukon de ***Mia Lukto,*** la ĉefverko de tiu monstro, Adolfo Hitlero, oni legas, ke li ne volas militon, ke li volas nur pacon kun francoj kaj britoj: *Ofendas min tiuj, kiuj diras, ke mi volas militon. Ĉu mi estu freneza?* Belaj vortoj, evidente, kiuj eble konvinkis tiutempajn ŝtatestrojn, kiuj verŝajne








Ĉi tie oni pafmortigis tiujn, kiuj ne plu utilis por sklava laborado.

aliaj homoj nur pro tio, ke ili naskiĝis aliloke, aŭ ke ili havas alian kredon, aŭ ili eĉ ne landon havas, kiel tiuj judoj en la bildo, simpla pacisma emo utilis al nenio krom mortejo. Tion komprenis la heroaj judoj de kvartalo de Varsovio, kiuj, kvankam ili estis buĉitaj per kanonoj germanaj, mortis pafante. Sekve, ilia morto ne estis tiom malhoma kiel la kompatinduloj, kiuj eniris Oswicem-n. Ni ĉiuj estis en la juda kvartalo de Varsovio, ni ĉiuj estis en Oswicem. Ĉar ni ĉiuj malsamas unu la aliajn, eĉ se ni ne volas pensi pri tio. Ĉar neniu el ni estas *arioj* (fakte, eĉ germanoj arioj ne estas!)

Ni ĉiuj amu liberecon esti tia, kian ni volas, eĉ se ni estas tiaj, kiaj ni jam hazarde estas.

Je paĝo 13-a ni povas vidi la lokon, kie oni pafmortigis la homojn, kiuj ne plu povis stari por labori. Nun plena floringo memorigas nin pri tiuj teruraj eventoj tie. Eĉ se tio estas doloriga por multaj homoj, ĝi daŭre estas memoraĵo pri tiam, kiam homo freneziĝis kaj forgesis, ke ĉio homa interesas al homo.




Kadre de la menciita Projekto Komenjuz, je la lernejo kie mi laboras, kelkaj el ni pretigis fotan ekspozicion pri tiu evento, la tago, kiam usonaj soldatoj liberigis ĝin. Dum preskaŭ unu monato pli ol mil kvin cent lernejanoj, instruistoj, gepatroj kaj vizitantoj alproksimiĝis al tiu muro de ni bildigita, kiun oni povas vidi je paĝo 12-a, kaj lernis ion pri la hororojn, kiujn mi kaj miaj kolegoj fotis, kiam ni vizitis Oswicem lastan novembron. Ili vidadis, demandis kaj pri-komentis tion, kaj ni klarigis pri tio, kio okazis en civiliza Eŭropo, kiam homoj komencis kredi mensogojn, ĉar mensogoj estis pli agrablaj ol veroj. Kiam morto de aliaj estis monero por aĉeti propran trankvilon. Kiam problemoj de aliaj ne plu estis problemoj oniaj.

Dum nia kvinjara internacia lerneja projekto ni faris aliajn aferojn, sed ni elektis tiun ĉi kiel kulminon, ĉar fakte malmankis vortoj antaŭ la grando de tiu evento kaj sekvoj al ĝi: fakte, la nunan mondon oni ne povas klarigi sen tio, kio okazis en Oswicem, kaj sen ĉio, kio kondukis al ĝi, kaj sen la sekvoj de tio, ke ĝi okazis: Usono devis veni en Eŭropon, ĉar usonanoj estas vere eŭropanoj devenaj kaj anime, sed certe samtempe ne britoj aŭ germanoj, aŭ francoj..., kaj la limo, kiun oni atingis por ebligi Oswicem ja movis ĉiujn krei la necesajn rimdedojn, por ke tio ne plu ekzistos denove.

La lasta parto de nia ekspozicio memorigis rigardanton, tamen, ke post Oswicem ekzistis GULAG, kortuŝe denoncita de Aleksander Solĵenitcin; kaj la du eventoj, interkatenitaj, memorigas onin, ke ne ĉion oni atingis en la kampo de homa toleremo kaj kunvivado, kaj ke oni ne povas naive fidi pri tio, ke oni jam lernis la lecionon. Gulag, same kiel Oswicem, venis el tio, ke oni forprenis liberecon diri, ke tio, kion oni vidas, ne estas justa. Ili venis el tio, ke homoj ne kuraĝis diri sian penson. Ili venis el tio, ke oni akceptis aŭtoritaton de malhonestaj homoj, kvazaŭ ili estu honestaj.

Ni pledu por tio, ke ĝi **neniam** plu **povos** okazi. **Ni ne permesu tion**.

*Jesuo de las Heras*

# Komenski

Kiel eble oni scias, Komenski estis la familia nomo de la unua homo, kiu diris, ke edukado estu por ĉiuj geinfanoj en la mondo sama kaj samtempa. Antaŭ li nur idoj de riĉuloj povis studi, malinkluzivante de tio idinojn.

La Eŭropa Unio ekestigis interesan internacian kaj interlernejan Projekton, kiun ĝi nomigis laŭ tiu revulo, fantaziulo kaj optimisma homo, kiu ne kredus kiel vaste kaj tutmonde sia ideo jam iĝis, se li vivus nun, tri jarcentojn post lia morto.


Komenski, alidirite Comenius

Mi ĵus partoprenis projekton kadre de tiu pli granda Projekto, kies nomo estas **MI antaŭ la aliaj: Toleremo kaj ĝiaj limoj**. Mi rakontas pli vaste aliloke en ĉi tiu numero, sed mi nur notigu nun, ke la ĉeesto en tiu projekto utilis al mi pri lerni la koncernajn strategiojn por elteni tiom multe kaj abunde da diskriminacio kaj maljusteco, kiujn mi suferis en la sino de SAT de kiam mi trifoje revenis en ĝin, esperante, ke mi eraris pri mia takso kaj zorgoj pri tiu socio.

Evidente, miajn ideojn kaj juĝojn oni povus taksi kiel subjektivaj kaj eraraj, do mi nur montros al pigraj legantoj de **Kajeroj el la Sudo**, por kiam li aŭ ŝi havos nenion pli gravan fari, ke ili indulgu sin per la legado de tiu ekzempla mesaĝo, kiun mi sendis al mia *virtuala* amiko Komenski, kiu reprezentas kvardeko da diversaj geesperantistoj dise laŭ la mondo, al kiuj mi *blinde* sendis tiun ĉi mesaĝon, kiu respondis amikan leteron de samideano, kiu anas kaj SAT-diskuton kaj SAT-kulturon, listojn posedatajn de nia Sennacieca Asocio Tutmonda. Tuj post tiu sendado, mi konstatis, ke plej bonan omaĝon mi farus al Jan Komenski, vera ĉampiono pri justeco kaj klerigado, kreante tiun virtualan personon, per kiu mi kaŝnomiĝu miajn plej altajn sopirojn per teksta formo. Unue, mi prezentu la anoncitan respondon al li:

**To:** komenski@hotmail.com
**Subject:** Re: Fwd: Re: [SAT-diskuto] Pri Kulturo en SAT kaj klasbatalo internacia
**Bcc**: diversaj@esperantistoj.edu (inter kiuj vi, leganto, eble estis).

Je la 31/05/2005 15:27, *oni* diris al mi:

mi pensas ke la akuzo kiun vi, Jakvo, faris pri Jesuo (nome ke li estas propagandisto de faŝismo), meritas ke Jesuo ĝin konu por ke li povu komenti ĝin.

Tio ne estas malrespekto al transigo de informo de tiu ĉi listo ekster ĝin, ĉar laŭ mi, Jesuo estas plenrajta membro de tiu ĉi listo arbitre kaj kontraŭstatute eksigita.

Jen respondo mia:

Karaj kamaradoj!

Alia informanto, kies nomon li petis al mi, ke mi ne diskonigu momente..., sendis al mi kelkajn mesaĝojn de tiu dissendolisto, SATkulturo, kiun mi taksis ne propraĵo ekskluziva de SAT, ĉar mi vidis la nomon de Renato Korseti kiel unu el la mastrumantoj, kaj mi sentas grandan

respekton al li, kaj mi sekve esperas, ke li ne kompliciĝu al nejusta decido, eĉ se pri banala afero, kiel eksigo aŭ maleksigo en tute negrava dissendolisto, kiu vere ne helpas al SAT kaj kiel laŭtparolilo kaj kiel kulturilo de nia asocio.

Laŭ tiu mesaĝo, ne temis ĉifoje pri Jakvo, sed pri Vinko Markov. Mi ne konas tiun homon, sed li verŝajne konas min tre bone. Pro tio li diras, ke

*«2) Mi forigis Jesuon el la listo. Al tiuj, kiuj jam ne sufiĉe «gustumis» Jesuon, kaj taksos tiun paŝon arbitra kaj maljusta, mi konsilas legi la lastan numeron de «Kajeroj el la Sudo» http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k66.html, kun laŭdoj al la papo kaj kulpigo de la maldekstro pri la Hispana milito. Se tio ne sufiĉas al vi, mi povos sendi al vi kompilaĵon el citaĵoj de tiu revuo, sed tion mi faros EKSTER la kadro de ĉi tiu listo, por ne ĝeni tiujn, kiuj satas pri tiuj polemikaĉoj.»*

Nu, kion diri? Eĉ Jakvo ne dirintus tion pli bone. Laŭ li, oni ne povas laŭdi la Papon, sed li ne diras kial. Li iam sendis al mi artikolon, kiun mi publikigis en ***Kajeroj el la Sudo*** nr-o 65-a, «Vetkuro de helikoj». Ĝi estas tre densa artikolo, sed neniu ŝajnas ĝeni sin respondi, kaj ankaŭ mi ne faros tion, ĉar, aldone, mi trovas ĝin amuza. La intenco de la aŭtoro eskapas al mia kompreno, sed tiel okazas ofte al redaktoro, kies respondeco ne inkluzivas pravigi aŭ malpravigi aŭtorojn... El tiu artikolo, mi komprenas, ke la personeco de tiu homo estas stranga kaj komplika, sed ne necese malbonintenca. Sed mi ne komprenas, ke li forigis min sen antaŭa averto. Ankaŭ mi ne komprenas, ke li ne kontraŭis la tezojn —laŭ li erarajn— pri la genezo de la Hispana Intercivitana Milito. Ne mi ekpensis ilin, tamen: mi nur legis librojn, kies argumentoj konvinkis min. Eble la argumentoj de Vinko konvinkus min pli bone..., se li dirus ilin al mi. Sed ŝajnas, ke li ne diras argumentojn al mi. Kial, do? Ĉu temas pri unu homo pli, kiel Jakvo kaj Kani, kiuj ne kuraĝas debati serioze kaj per argumentoj? Vidu, ke Jakvo perforte ekskludas min de SAT, kaj Vinko perforte ekskludas min de SATkulturo. Ĉu tio estas sufiĉe grava kaŭzo por milito..? Nu, mi konsideros la aferon, ĉu indas, ke estu milito, kaj se jes, mi militos kontraŭ ili ambaŭ per ĉiuj rimedoj, kiujn mi povos uzi. Tamen, mi ne gravigas tiom multe tiujn du homojn, kiuj misuzas sian etan eron da povo, kiu hazarde venis en siajn manojn. Mi nur gratulos min, ke ili ne veran povon havas, kaj se ili agas same kiel ĝis nun, fakte neniam havos povon. Ĉar estus terure tio, kion ili farus per ĝi. Ĉu vi memoras pri tiu sceno en ***La granda diktatoro***, kie la diktatoro ludas kun la terglobo ĝis kiam li finfine eksplodigas ĝin? Jen Jakvo. Jen Vinko. Do, plejbone ili ludu per tiuj ludiloj, SATkulturo kaj SAT, dum ili daŭras.

Eble estas peti tro el via bonvolemo, amikoj, ke unu el vi enkonduku mian mesaĝon en la diskutolisto SATkulturo. Tiel estu mia adiaŭo al la kunuloj, aparte al Gunnar kaj al Cez, kun kiuj mi havis la plezuron diskuti laste. Se oni petas al mi, ke mi denove venu en SATkulturon, mi opinias, ke mi ne venos, ĉar mi vidas, ke tiu dissendolisto vere havas nenion oferti al mi. Kaj la kosto, ĉifoje, estas tro alta por mi: perdi mian tempon en afero, kiu povas redoni nenion al mi... Do, mi adiaŭas vin ĉiujn, karaj amikoj. Se oni deziras ion el mi, bonvole uzu mian retadreson privatan, jheras1@aliso.pntic.mec.es .

Elkore mi salutas vin ĉiujn,

*Jesuo.*

---

P/S.- Mi uzis la adresojn de elstaraj esperantistoj, kiujn mi havas, esperante, ke almenaŭ unu el vi apartenas al SATkulturo. Estis ĝis mia forigo ĉirkaŭ 40 kamaradoj tie, do mi esperas, ke almenaŭ kelkaj apartenas al tiu dissendolisto. Se vi ne apartenas al ĝi, mi esperas, ke vi konsideru la tutan aferon kiel unu pli inter la amuzaj konfliktetoj inter esperantistoj. Fakte, mi nun verkas novelon pri tiuj aferoj, kaj mi kolektas materialon sekve. :-)

# La Faraono

*ĈAPITRO 14-A.*

En la monato Ĥoiak, de la mezo de septembro ĝis la mezo de oktobro, la akvoj de Nilo kreskis plej alten kaj komenciĝis malgranda malleviĝo En la ĝardenoj oni kolektis la tamarindajn fruktojn, daktilojn kaj olivojn, kaj la arboj ekfloris duan fojon.

En ĉi tiu tempo lia sankteco Ramzes XII forlasis sian sunan palacon apud Memfiso. Kun granda sekvantaro en kelkdeko da ŝipoj riĉe ornamitaj li veturis Tebojn danki la tieajn diojn pro la bona leviĝo de Nilo kaj samtempe fari oferojn en la tomboj de siaj eterne vivantaj antaŭuloj...

La granda monarĥo tre favore adiaŭis sian filon kaj heredonton, sed la administradon de la ŝtataj aferoj dum sia foresto li konfidis al Herhor.

La princo Ramzes tiel forte estis impresita de ĉi tiu manko de l' konfido de la monarĥo, ke dum tri tagoj li ne eliris el sia domo, manĝis nenion kaj nur ploris. Poste li ĉesis sin razi kaj transloĝiĝis en la bienon de Sara, por eviti renkonton kun Herhor kaj kolerigi la patrinon, kiu laŭ lia opinio estis la kaŭzo de liaj malfeliĉoj.

Tuj en la sekvinta tago en ĉi tiu rifuĝejo vizitis lin Tutmozis, tirante post si du ŝipojn kun muzikistoj kaj dancistinoj kaj trian plenan de manĝaĵo, floroj kaj vino. Sed la princo ordonis al la muzikistoj kaj dancistinoj veturi for, kaj kondukante la adjutanton en la ĝardenon, diris:



—Kredeble mia patrino (ŝi vivu eterne!) sendis vin ĉi tien por forŝiri min de la Hebreino?... Diru do al ŝia reĝa moŝto, ke se Herhor fariĝus ne nur la vic-reĝo, sed eĉ filo de mia patro, mi faros, kio plaĉos al mi... Mi komprenas tion... Hodiaŭ ili volus forpreni de mi Saran, kaj morgaŭ .... Mi pruvos al ili, ke mi rezignos nenion.

La princo estis incitita: Tutmozis levis la ŝultrojn, fine li respondis:

—Kiel la vento forportas la birdon en la dezerton, tiel la kolero elĵetas la homon sur la bordojn de la maljusteco. Ĉu vi povas miri, ke la pastroj ne ĝojas, ke la kronprinco ligis sian vivon kun virino de alia kredo? Estas vero, ke Sara ne plaĉas al ili, tiom pli, ke vi posedas ŝin solan; se vi havus kelke da diversaj virinoj, kiel ĉiuj junaj nobeluloj, oni tute ne atentus la Hebreinon. Sed kion malbonan ili faris al ŝi?... Nenion. Kontraŭe, iu pastro defendis ŝin kontraŭ furiozaj atakantoj, kiujn vi bonvolis liberigi el la malliberejo.

—Kaj mia patrino ... —interrompis la kronprinco.

Tutmozis komencis ridi.

—Via respektinda patrino —daŭrigis li —amas vin, kiel siajn proprajn okulojn kaj sian propran koron. Sendube

ankaŭ al ŝi ne plaĉas Sara, sed ĉu vi scias, kion ŝi foje diris al mi?... Ke mi ŝtelu de vi Saran!... Vi vidas, kiel ŝi ŝercis. Mi respondis ankaŭ per ŝerco:»Ramzes donacis al mi aron da ĉashundoj kaj du siriajn ĉevalojn, kiam ili tedis lin; do eble iam li transdonos al mi ankaŭ sian amatinon, kiun mi kredeble devos akcepti kun aldono.

—Eĉ ne sonĝu pri tio. Al neniu mi hodiaŭ donus Saran, ĝuste tial, ke pro ŝi mia patro ne nomis min vic-reĝo.

Tutmozis balancis la kapon.

—Vi tute eraras, vi tiel eraras, ke tio timigas min. Ĉu efektive vi ne komprenas la kaŭzojn de la malfavoro, kiujn konas ĉiu klera homo en Egipto?...

—Mi scias nenion....

—Tiom pli malbone —diris embarasite Tutmozis. —Vi do ne scias, ke de l' tempo de la manovroj, la soldatoj, precipe grekaj, en ĉiuj drinkejoj trinkas por via sano...

—Por tio ja ili ricevis la monon.

—Jes, sed ne por krii per laŭta voĉo, ke kiam vi ekregos post lia sankteco (li vivu eterne!), vi komencos grandan militon, post kiu grandaj ŝanĝoj fariĝos en Egipto... Kiaj ŝanĝoj?... Kaj kiu, dum vivas la faraono, kuraĝas paroli pri la planoj de lia heredonto?

Nun la princo malgajiĝis.

—Jen unu afero, sed mi diros al vi ankoraŭ pri alia —daŭrigis Tutmozis, —ĉar la malbono, kiel hieno, neniam iras unuope. Ĉu vi scias, ke inter la kamparanoj oni kantas vin, kiel vi liberigis el la malliberejo la atakintojn, kaj kio estas pli malbona, ankaŭ tie oni parolas, ke kiam vi ekregos post lia sankteco, oni neniigos ĉiujn impostojn. Mi devas tuj aldoni, ke ĉiufoje kiam oni komencis babili inter la kamparanoj pri la maljusteco aŭ pri la impostoj, ĉiam eksplodis ribeloj. Aŭ ekstera malamiko sinĵetis sur la malfortigitan ŝtaton, aŭ Egipto dividiĝis en tiom da partoj, kiom da nomarĥoj estis... Cetere juĝu vi mem: ĉu estas konvene, ke en Egipto oni ripetas iun ajn nomon pli ofte, ol la nomon de l' faraono?... kaj ke iu sin lokas inter la popolo kaj nia sinjoro?... Se vi permesus, mi rakontus al vi, kion pri tio opinias la —pastroj...

—Parolu, mi petas vin...

—Tre saĝa pastro, kiu de la supro de la templo de Amon observas la tielajn movojn, elpensis sekvantan apologon:

La faraono estas la suno, la kronprinco la luno. Kiam la lumantan dion sekvas de malproksime la luno, ni havas la helecon tage kaj la helecon nokte. Kiam la luno volas esti proksime de la suno, tiam ĝi mem malaperas kaj la noktoj estas mallumaj. Sed se okazas, ke la luno stariĝas antaŭ la suno, tiam fariĝas mallumiĝo kaj granda paniko en la mondo.

—Kaj ĉiuj ĉi babiladoj —interrompis, Ramzes —atingas la orelojn de lia sankteco?... Ve al mia kapo!... Estus pli bone, se mi neniam estus reĝa filo!...

—La faraono, kiel tera dio, scias pri ĉio; sed li estas tro potenca por atenti la kriojn de ebriaj soldatoj, aŭ murmurojn de kamparanoj. Li komprenas, ke ĉiu Egiptano estas preta doni por li sian vivon kaj vi antaŭ ĉiuj.

—Veron vi diris!... —respondis la ĉagrenita princo. —Tamen en ĉio ĉi mi vidas novan malnoblecon kaj malsincerecon de l' pastroj —aldonis li viviĝante. —Do mi, mi kovras la majeston de nia sinjoro, ĉar mi liberigas el la malliberejo la senkulpajn kaj malpermesas al mia bienluanto turmenti la kamparanojn per maljustaj impostoj?... Sed kiam lia ekscelenco Herhor komandas la armeon, nomas ĝiajn estrojn, faras traktatojn kun fremdaj princoj, kaj al mia patro ordonas pasigi la tempon en preĝoj...

Tutmozis kovris la orelojn kaj piedfrapante ekkriis:

—Silentu jam, silentu!... ĉiu via vorto estas blasfemo... La ŝtaton regas nur lia sankteco, kaj ĉio, kio ajn fariĝas sur la tero, devenas de lia volo. Herhor estas nur servisto de l' faraono kaj faras tion, kion ordonas la sinjoro... Iam vi mem konvinkiĝos... Ne estu malbone komprenitaj miaj vortoj!...

La princo tiel malgajiĝis, ke Tutmozis interrompis la diskuton kaj plej rapide adiaŭis la amikon. Kiam li sidiĝis en la ŝipeto, ornamita de baldakeno kaj kurtenoj, li profunde ekspiris kaj eltrinkinte grandan pokalon da vino, komencis mediti:

»Brr!... Mi dankas la diojn, ke ili ne donis al mi tian karakteron, kian posedas Ramzes. Li estas la plej malfeliĉa en la plej feliĉaj kondiĉoj... Li povus havi la plej belajn virinojn el Memfiso, kaj li sin ligis kun unu por turmenti la patrinon! Dume, li turmentas ne la patrinon, sed ĉiujn ĉi ĉastajn virgulinojn kaj fidelajn edzinojn, kiuj sekiĝas de melankolio, ke la kronprinco, tiel bela knabo, ne forprenas de ili la virtecon aŭ ne devigas ilin al la malfideleco. Li povus ne nur trinki plej bonan vinon, sed eĉ sin bani en ĝi, kaj li preferas la mizeran soldatan bieron kaj sekan platan kukon, frotitan per ajlo. De kie ĉi tiuj kamparanaj gustoj? Mi ne komprenas. Oni povas supozi ke la respektinda sinjorino Nikotris en la plej danĝera tempo tro multe rigardis manĝantajn laboristojn?...

«Li ankaŭ povus nenion fari de la tagiĝo ĝis la nokto. Se li volus, eĉ nutrus lin la plej eminentaj sinjoroj, iliaj edzinoj, fratinoj kaj filinoj. Sed li ne nur mem etendas la manon por preni la manĝaĵon, sed, eĉ kvazaŭ por ĉagreni la noblan junularon, li mem lavas sin, mem sin vestas, kaj lia frizisto tutajn tagojn kaptas per laĉoj birdojn kaj ne aplikas sian talenton.

«Ho Ramzes, Ramzes!... —sopiris la elegantulo. —Ĉu la modo povas flori, kiam ni havas tian princon... Jam de unu jaro ni portas samajn antaŭtukojn kaj la perukoj ne malaperas nur dank' al la kortegaj altranguloj, ĉar Ramzes tute ne volas porti perukojn. Ĉu tio ne estas granda humiligo por la nobelularo?

«Kaj ĉion ĉi... brr... faras la malbenita politiko... Oh, kiel feliĉa mi estas, ke mi ne bezonas diveni, kion oni pensas en Tiro aŭ Ninivo, zorgi pri la salajro por la soldatoj, kalkuli ĉu la loĝantaro de Egipto kreskas aŭ malgrandiĝas kaj kiajn impostojn oni povas kolekti. Terura afero estas diri al si mem: mia kamparano ne pagas tiom, kiom mi bezonas kaj elspezas, sed kiom permesas la leviĝo de Nilo. La patro Nilo ne demandas ja miajn kreditorojn: kiom mi ŝuldas al ili?»

Tiel pensis la eleganta Tutmozis kaj per ora vino fortigis la ĉagrenitan animon. Kaj antaŭ kiam la ŝipeto atingis Memfison, faligis lin tiel forta dormo, ke la sklavoj devis sur la brakoj transporti sian sinjoron ĝis la portilo.

Post la foriro de Tutmozis, kiu similis forkuron, la kronprinco profunde ekmeditis, eĉ eksentis timon.

La princo estis skeptikulo, kiel edukito de la plej altaj pastraj lernejoj kaj membro de la plej alta aristokrataro. Li sciis, ke dum unuj pastroj per longedaŭraj fastoj kaj sobreco sin preparas al elvokado de l' spiritoj, aliaj nomas la spiritojn halucinacio aŭ trompo. Li vidis multfoje, ke la sankta bovo Apis, antaŭ kiu la tuta Egipto falis teren, ricevis ofte fortajn batojn de plej malaltaj pastroj, kiuj donis al li nutraĵon kaj submetis bovinojn. Fine, li komprenis, ke lia patro, Ramzes XII, kiu por la popolaĉo estas eterne vivanta dio kaj ĉiopova sinjoro de l' mondo, estas en la realeco sama homo kiel la aliaj, nur iom pli malsanema ol aliaj maljunuloj kaj kies povon tre limigis la pastroj.

Ĉion ĉi la princo vidis kaj multajn aferojn li mokis en sia animo, eĉ publike. Sed lia tuta libertinismo falis antaŭ la vereco de l' fakto, ke ne estas permesite al iu ajn ridi la titolojn de l' faraono!...

Ramzes konis la historion de sia lando kaj memoris, ke en Egipto oni multon pardonis al la grandaj. Granda sinjoro povis detrui kanalon, mortigi sekrete homon, ridi en silento la diojn, akcepti donacojn de l' fremdlandaj ambasadoroj... Sed du pekoj estis nepardoneblaj: la perfido de la pastraj misteroj kaj la perfido de l' faraono. Homo, kiu faris tion, malaperadis, iafoje post unu jaro, el la mezo de siaj servistoj kaj amikoj. Sed kie li estis kaj kio okazis al li, oni ne kuraĝis demandi.

Do Ramzes sentis, ke li estas sur sama krutaĵo, de l' tempo kiam la soldatoj kaj

kamparanoj komencis ripeti lian nomon kaj diskuti pri iaj liaj planoj: pri ŝanĝoj en la ŝtato kaj pri estontaj militoj. Pensante pri tio, la princo sentis impreson, ke la sennoma amaso de mizeruloj kaj ribeluloj superforte puŝas lin, la kronprincon sur la supron de la plej alta obelisko, de kie oni povas nur fali kaj dispeciĝi.

Poste, kiam post longa vivo de l' patro li fariĝos faraono, li havos rajton kaj rimedojn plenumi tiajn agojn, pri kiuj neniu en Egipto povus pensi sen teruro. Sed hodiaŭ li vere devas sin gardi, ke oni ne proklamu lin perfidulo kaj ribelulo kontraŭ la fundamentaj leĝoj de la ŝtato.

En Egipto estis unu sola videbla estro: la faraono. Li regis, li volis, li pensis por ĉiuj, kaj ve al tiu, kiu kuraĝus laŭte dubi pri la ĉiopoveco de l' faraono, aŭ paroli Pri iaj siaj planoj, aŭ pri ŝanĝoj entute.


La planoj estis farataj en unu sola loko: en la ĉambrego, kie la faraono aŭskultis la opiniojn de la membroj de la privata konsilantaro kaj esprimis al ili sian propran opinion. Ĉiuj ŝanĝoj povis eliri nur de tie. Tie brulis la sola videbla lampo de la ŝtata saĝo kaj ĝia brilo lumigis la tutan Egipton. Sed ankaŭ pri tio pli sendanĝere estis silenti.

Ĉiuj ĉi rimarkoj kun rapideco de l' vento traflugis la animon de l' kronprinco, kiam li sidis sur ŝtona benko en la ĝardeno de Sara, sub kaŝtanarbo, kaj rigardis la ĉirkaŭantan lin pejzaĝon.

La akvo de Nilo jam iom malleviĝis kaj komencis fariĝi klara, kiel kristalo. Sed la tuta lando havis ankoraŭ aspekton de l' mara golfo, semita per multenombraj insuloj, sur kiuj estis videblaj konstruaĵoj, ĝardenoj legomaj kaj fruktaj, kaj tie ĉi kaj tie aretoj da grandaj arboj, servantaj kiel ornamo.

Ĉirkaŭ ĉiuj ĉi insuloj krakis la gruoj kun siteloj, per kiuj homoj nudaj, brunkoloraj, en malpuraj kufoj kaj zonoj ĉerpis la akvon el Nilo kaj verŝis ĝin, unu post alia, en pli kaj pli alte kuŝantajn putojn.

Precipe unu sceno fiksiĝis en la memoro de Ramzes: Sur la deklivo de monteto laboris tri gruoj: unu verŝis akvon el la rivero en la plej


Knabinoj de l' Faraon'

malaltan puton, la dua ĉerpis el ĝi kaj levis la akvon kelke da ulnoj pli alten; la tria el la meza puto transverŝis la akvon en la plej altan puton, sur la supro de la monteto. Tie kelke da homoj, ankaŭ nudaj, ĉerpis la akvon per kruĉoj kaj surverŝis bedojn de legomoj aŭ per ŝprucigiloj malsekigis la arbojn.

La movoj de la gruoj supren kaj malsupren, la klinado de l' siteloj, la ŝprucado de l' akvo estis tiel ritmaj, ke homoj, kiuj plenumis ilin, ŝajnis aŭtomatoj. Neniu el ili alparolis sian najbaron, ŝanĝis lokon aŭ sin turnis; ĉiu nur sin klinis kaj rektiĝis, ĉiam same de la mateno ĝis la vespero, de unu monato ĝis alia, kaj kredeble de la juneco ĝis la morto.

—Kaj tiaj kreaĵoj —pensis la princo, rigardante la laboron de la terkulturistoj —tiaj kreaĵoj volas min fari plenumanto de iliaj ĥimeroj!... Kiajn ŝanĝojn en la ŝtato ili povas postuli? Nenion alian ol tion, ke la homo ĉerpanta el la plej malalta puto transiru al la pli alta aŭ anstataŭ surverŝi la bedojn per sitelo, li surverŝu la arbojn per ŝprucigilo.

La kolero ekregis lin kaj sento de l' humileco ĉe la penso, ke li, la kronprinco, dank' al la fabeloj de tiaj kreaĵoj, kiuj la tutan vivon balanciĝas antaŭ putoj kun malpura akvo, ne fariĝis la vic-reĝo de la faraono!

En la sama momento li ekaŭdis mallaŭtan murmuron inter la arboj, kaj delikataj manoj sin apogis sur liaj ŝultroj.

—Kio do, Sara? —demandis la princo, ne turnante la kapon.

—Vi estas malĝoja, mia sinjoro? —respondis ŝi. —Ne tiel ĝojis Moiso, ekvidinte la promesitan teron, kiel mi, kiam vi diris, ke vi transloĝiĝas ĉi tien por resti kun mi. Sed jam unu tagon ni estas kune, kaj mi ne vidis ankoraŭ vian rideton. Vi eĉ ne parolas al mi, sed paŝas malgaja, kaj nokte vi ne karesas min, sed sopiras.

—Mi havas ĉagrenon.

—Diru ĝin al mi. Ĉagreno estas kiel trezoro, ricevita por gardado. Dum ni solaj gardas ĝin, eĉ la dormo forkuras de ni kaj nur tiam ni trankviliĝas, kiam ni trovas duan gardiston.

Ramzes ĉirkaŭprenis ŝin kaj sidiĝis apud ŝi sur la benko.

—Kiam la kamparano —diris li kun rideto — ne sukcesos ĝustatempe antaŭ la leviĝo de Nilo kolekti la rikoltojn, la edzino helpas lin. Ŝi ankaŭ helpas lin melki la bovinojn, portas al li manĝaĵon, kiam li forestas, lavas lin, kiam li revenas de la laboro. Tiel aperis la kredo, ke la virino povas malgrandigi la embarasojn de l' viro.

—Vi tion ne kredas, sinjoro?...

—La ĉagrenojn de princo —respondis Ramzes —ne forigos virino, eĉ tiel saĝa kaj potenca, kiel mia patrino.

—Pro Dio! Kiaj ili estas, diru al mi?... —insistis Sara, karese sin premante al la ŝultro de l' kronprinco. —Laŭ niaj legendoj, Adamo forlasis la paradizon por Eva, kaj li ja estis la plej granda reĝo de la plej bela regno...

La princo ekmeditis, post momento li komencis:

—Ankaŭ niaj saĝuloj instruas, ke pli ol unu viro forlasis altan rangon por virino. Sed oni ne diras, ke iu viro akiris ion grandan per virino; eble nur ia militestro, al kiu faraono donis sian filinon kun granda doto kaj alta ofico.

Sed helpi iun atingi pli altan postenon aŭ eĉ nur eliri el embaraso, —tion la virino ne povas.

—Ĉar eble ŝi ne amas, kiel mi amas vin, sinjoro... —murmuretis Sara.

—Mi scias, ke vi amas min senlime... Neniam vi postulis de mi donacojn, neniam vi protektis tiajn, kiuj ne ŝanceliĝas serĉi karieron eĉ sub la litoj de princaj amatinoj. Vi estas pli dolĉa, ol ŝafido kaj silentema kiel la nokto apud Nilo. Viaj kisoj estas kiel la parfumoj el la lando Punt, via ĉirkaŭpreno estas dolĉa kiel la dormo de laca homo. Mi ne havas mezurilon por via beleco, nek vortojn por viaj kvalitoj. Vi estas mirindaĵo inter la virinoj, kies buŝo estas plena de maltrankvilo, kaj kies amo kostas kare. Sed malgraŭ tuta via perfekteco, kiel vi povas helpi

miajn embarasojn? Ĉu vi faros, ke lia sankteco proklamu grandan militon kontraŭ la oriento kaj nomos min militestro? Ĉu vi donos al mi almenaŭ la Memfisan korpuson, pri kiu mi petis, aŭ faros min vic-reĝo de Malsupra Egipto? Kaj ĉu vi igos ĉiujn regnanojn de lia sankteco pensi kaj senti kiel mi, la plej fidela el ĉiuj?...

Sara mallevis la manojn sur la genuojn kaj murmuretis malĝoje:

—Vere, mi ne povas... Mi povas nenion!...

—Kontraŭe vi povas multon!... Vi povas gajigi min —respondis Ramzes ridetante. —Mi scias, ke vi lernis danci kaj ludi. Demetu do viajn longajn vestojn, kiuj konvenas al pastrinoj, gardantaj la fajron, kaj vestu vin per diafana muslino, kiel... la feniciaj dancistinoj... kaj dancu, kaj karesu min, kiel ili...

Sara kaptis lin je la manoj kaj kun flamoj en la okuloj, ekkriis:

—Vi vizitas tiajn malĉastulinojn?... Diru... mi eksciu pri mia mizero... Kaj poste resendu min al la patro, en mian dezertan valon, kie, ho, se mi ne estus vin vidinta!...

—Trankviliĝu, trankviliĝu —diris la princo, ludante kun ŝiaj haroj.

—Mi ja devas vidi dancistinojn, se ne en la festenoj, almenaŭ en reĝaj solenoj, aŭ dum diservo en la temploj. Sed ili ĉiuj kune ne interesas min tiel, kiel vi sola, cetere... kiu el ili povus vin egali. Vi havas korpon kiel la statuo de Izido, skulptita en eburo, kaj el la dancistinoj ĉiu havas ian difekton. Unuj estas tro grasaj, aliaj havas maldikajn piedojn aŭ malbelajn manojn, aliaj portas malnaturajn harojn. Kiu el ili estas kiel vi?... Se vi estus Egiptanino, ĉiuj temploj konkurus por havi vin kiel unuan kantistinon. Kion mi diras?... Se nun vi, aperus en Memfiso en diafana vesto, la pastroj paciĝus kun vi, se nur vi konsentus partopreni en la procesioj.

—Al ni, filinoj de Judo, malpermesite estas porti maldecajn vestojn.

—Kaj danci, kaj kanti?... Por kio do vi tion lernis?

—Niaj virinoj kaj knabinoj dancas unu kun alia, kaj ne por semi en la viraj koroj fajrajn grajnojn de la deziro. Kaj mi kantas... Atendu mia sinjoro, mi kantos por vi...

Ŝi leviĝis de la benko kaj iris al la domo. Baldaŭ ŝi reaperis. Post ŝi juna knabino, kun timaj nigraj okuloj, portis harpon.

—Kiu estas ĉi tiu knabino? —demandis la princo. —Atendu, mi jam vidis ie ĉi tiun rigardon ... Ah, ah, kiam mi estis ĉi tie la lastan fojon, ĉi tiu timema knabino rigardis min, kaŝita inter la arbetoj...

—Tio estas mia parencino kaj servistino, Ester —respondis Sara. —Ŝi loĝas ĉe mi jam unu monaton, sed timas vin, sinjoro, ŝi do ĉiam forkuras. Povas esti, ke iam ŝi rigardis vin kaŝite.

—Vi povas foriri, mia infano —diris la princo al la ŝtoniĝinta knabino, kaj kiam ŝi malaperis post la arboj, li aldonis: —Ŝi ankaŭ estas Hebreino -... Kaj la gardisto de via domo, kiu ankaŭ rigardas min, kiel ŝafo krokodilon?

—Tio estas Samuelo, filo de Esdreas, ankaŭ mia parenco. Mi prenis lin anstataŭ la Negro, al kiu vi, sinjoro, donacis la liberecon. Vi ja permesis al mi elekti miajn servistojn?...

—Jes, certe! Sendube ankaŭ la estro de la terlaboristoj estas Hebreo, ĉar li havas flavan vizaĝon kaj rigardas min tiel humile, kiel neniu Egiptano scius rigardi.

—Tiu —respondis Sara —estas Ezeĥiel, la filo de Ruben, parenco de mia patro. Ĉu ili ne plaĉas al vi, sinjoro?... Tio estas viaj tre fidelaj servistoj.

—Ĉu ili plaĉas!... —diris la princo malkontenta, tamburante per la fingroj sur la benko. —Ili ne estas ĉi tie por plaĉi al mi, sed por gardi vian propraĵon... Cetere ili ĉiuj estas al mi tute indiferentaj... Kantu, Sara.

Sara ekgenuis sur la herbo, ĉe la piedoj de l' princo, kaj pinĉinte kelke da akordoj sur la harpo, komencis:

—Kie estas tiu, kiu ne havas ĉagrenon? Kie estas tiu, kiu sin preparante al la dormo, havus la rajton diri: jen tago, kiun mi pasigis sen

malĝojo? Kie estas homo, kiu kuŝiĝante en la tombon, povus diri: Mia vivo pasis sen doloro kaj timo, kiel serena tago apud Jordano!

Sed kiel multenombraj estas tiuj, kiuj ĉiutage surverŝas sian panon per larmoj kaj kies domo estas plena de sopiroj.

La ploro estas la unua voĉo de l' homo sur ĉi tiu tero, kaj la ĝemo lia lasta adiaŭo. Plena de malĝojo li eniras en la vivon, plena de bedaŭro li malleviĝas al la loko de l' ripozo, kaj neniu demandos lin, kie li volus resti.

Kie estas tiu, kiu neniam sentis la maldolĉecon de l' ekzistado? Ĉu tio estas la infano, kies patrinon forrabis la morto, aŭ suĉulo ĉe la mamo, kiun la malsato sekigis, antaŭ kiam ĝi almetis sian buŝeton?

Kie estas la homo trankvila pri sia sorto, kiu ne mallevante la okulojn povus rigardi la morgaŭon? Ĉu tiu, kiu laborante sur la kampoj scias, ke ne en lia povo estas la pluvo kaj ke ne li montras la vojon al la akrido? Ĉu la, komercisto, kiu konfidas siajn riĉaĵojn al la vento, venanta oni ne scias de kie, kaj la vivon al la ondoj super senfundaĵo, kiu englutas ĉion kaj nenion redonas?

Kie estas la homo sen maltrankvilo en la animo? Ĉu tio estas la ĉasisto, kiu persekutas rapidan kapreolinon, kaj renkontas sur sia vojo leonon, kiu ridas la sagon? Ĉu tio estas la militisto, kiu laciĝante marŝas al la gloro, kaj renkontas arbaron da akraj lancoj kaj glavojn el bronzo, soifantajn sangon? Ĉu tio estas la granda reĝo, kiu sub la purpuro portas pezan kirason, kiu per sendorma okulo observas la armeojn de la potencaj najbaroj, kaj per la orelo kaptas la murmureton de la kurteno, timante, ke en lia propra tendo lin faligos la perfido?

Kaj tial la koro de l' homo en ĉiu loko kaj en ĉiu horo estas plenplena de malĝojo. En la dezerto lin minacas la leono kaj skorpio, en la kavernoj la drako, inter la floroj la venena serpento. Kiam la suno brilas, la avida najbaro meditas, kiel ŝteli lian teron, en la nokto la ruza rabisto palpas la pordon de lia ĉambro. En la infaneco li estas senpova, en la maljuneco senforta, en la matura aĝo —ĉirkaŭita de l' danĝeroj, kiel la baleno —de la profundaj akvoj.

Kaj tial, sinjoro, mia Kreinto, al vi sin turnas la laca animo. Vi alkondukis ĝin en ĉi tiun mondon, plenan de embuskoj, Vi inokulis al ĝi la timon de l' morto, Vi fermis ĉiujn vojojn de l' trankvileco, esceptinte tiun, kiu kondukas al Vi. Kaj kiel la infano, kiu ne scias paŝi, kroĉiĝas al la vesto de l' patrino por ne fali, tiel la mizera homo etendas manojn al via kompato kaj liberiĝas de la duboj...

Sara eksilentis, la princo meditis momenton kaj diris:

—Vi, Hebreoj, estas malgaja nacio. Se en Egipto oni kredus, kion instruas via himno, neniu ridus sur la bordoj de Nilo. La potenculoj sin kaŝus de l' timo en la subteraj galerioj de la temploj, kaj la popolo anstataŭ labori forkurus en kavernojn kaj tie atendus kompaton, kiu, cetere, venus neniam.

Nia mondo estas alia: ĉion oni povas havi en ĝi, sed ĉion oni mem devas fari. Niaj dioj ne helpas plorulojn. Ili malleviĝas sur la teron nur tiam, kiam la heroo, kiu ekkuraĝis fari superhoman agon, jam perdis ĉiujn fortojn.

Tiel estis, kiam Ramzes Granda sin ĵetis inter du mil kvincent malamikajn veturilojn, el kiuj ĉiu portis tri batalistojn. Nur tiam la senmorta patro Amon etendis al li sian manon kaj helpis lin frakasi la malamikojn. Sed se anstataŭ batali li estus atendinta la protekton de via dio, jam de longe sur la bordoj de Nilo la Egiptano paŝus kun la sitelo kaj brikoj, kaj la mizeraj Ĥetoj kun la papirusoj kaj bastonoj.

Tial, Sara, pli kredeble viaj ĉarmoj ol via kanto dispelos mian ĉagrenon. Se mi agus, kiel instruas la hebreaj saĝuloj, kaj atendus helpon de l' ĉielo, la vino forkurus de mia buŝo, kaj la virinoj de mia domo.

Kaj antaŭ ĉio mi ne povus esti posteulo de la faraono; mi estus kiel miaj fratoj, el kiuj unu ne povas trairi la ĉambron, ne apogante sin sur du sklavoj, kaj la alia saltas sur arboj!

# Kajeroj el la Sudo

## BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)


| | |
|---|---|
| REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461, E30080 MURCIA, HISPANIO** Tfn° (00 34) 658 166 323 | **Retskribu al jesuo@ono.com** |
| http://213.172.47.3/gazetoteko/kajeroj/k67.htm | |
| http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k67.htm | |






**Depósito legal: Z-2398-88. Presejo: Copygraph.**

**ISSN 1697-6460**